| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 26 n-ro 114/115 30.10.1975. |
| --- | --- |

# LA KARAKTERO DE LA GEOGRAFIAJ PROPRAJ NOMOJ

## - SPECIFE PRI LA "GENTO/LANDO"-SENCAJ NOMOJ -

(Manuel Gomes, SILVEIRA-PICO, Portugalio) &/

La ĉi-kuna artikolo estas fakte kvazaŭ la kerneca punkto - mia-vide la startopunkto - kaj mi jam pretigas aliajn (laŭ mi pli simplajn) rilate aliajn aspektojn de la Propraj Nomoj. Mi tamen tre deziras, ke oni seriozece rigardu la "enorman" belecon trovatan sur tiu tre granda kampo de la Lingvo, kiun ni parolas!

Daŭrigante tiun mian deziron, mi volas memorigi la tuton de la artikolo de H.Seppik Tallin (Sovetio) en la n-ro 2/3 de 20. 05. 1974 de Scienca revuo. Eĉ nur unu punkto tie trovata ne havas mian plenan dankamecan aprobon. Estus bone se oni akceptus por tiu mia manuskripto, la bonan ekzemplaron, kiun li abunde citas.

Antaŭ ol fini ĉi-tiun leteron, mi informas vin, ke mi pretigis identan artikolon por "Biblia Revuo", post kiam oni konvinkigis min, ke oni pretendas "modifi" la "facion" de la Propraj Nomoj. Tie, kiel ĉi-tie, mi tute subordigas mian atenton nur kaj precize al la uzo, - sen ia ajn propono!!! - La uzo estas tio, kio faris la regulojn.

---

&/SILVEIRA-PICO, Açores, Portugalio

Tiu artikolo, tamen estas organizita tute ali-aspekte, havas aliajn asertojn, aliajn ekzemplojn, kaj unu (tia...) sen la alia (la ĉi-kuna) donas nur partan aspekton de la tuto. Estus dezirinde, ke ili aperu pli malpli samtempe, ĉar certe ekzistas multaj legantoj kiuj abonas la du revuojn.

## A- LA DUSENCECO "POPOLO-LANDO" KAJ INVERSE "LANDO-POPOLO"

Kiam ĉe radikalo (gento-senca) oni havas la nocion, ke ĝi signifas (ul)o, t. e. (genta hom)o, kaj kiam ĉe alia radikalo (lando-senca) oni havas la nocion, ke ĝi vere signifas "lando", tio tute sufiĉus por meti punkton ĉe ĉiu-speca kompliko pri la land-nomigado, ĉar en la Lingvo oni havas la rimedon por - el ĉiu aparta el la du antaŭe diritaj nocioj - indiki la alian pere de koncernaj sufiksoj respektive "ujo" kaj "ano" kaj eventuale per iuj fakaj geografiaj komun-sencaj terminoj.

Tamen en la praktiko la afero ne ĉiam estas sam(grand)e evidenta a/ ĉu subjektive por ĉiu persono en si mem, b/ ĉu objektive rilate al ĉiu radikalo aparte. Oni notu ekzemple, ke:

a) La distingo de tiuj Propraj Nomoj en du apartaj klasoj - respektive gento-sencaj kaj lando-sencaj ne tiom evidentiĝas por ĉiu aparta uzanto. Estas notite pri diversaj radikaloj, ke ĉe unuj ili estas gento-sencaj dum ĉe aliaj ili tamen prezentiĝas kiel lando-sencaj ... Ne konvenas meti ekzemplojn.

b) Krome okazas, ke ĉe la radikaloj nomataj "gento-sencaj" oni vidas, ke ili tiom taŭge povas sence signifi la landon (tuton), kiel la popolon en ĝi, ekz: "Sveda politiko", "Sveda montaro", kiu prezentiĝas paralel-sence kiel "Tibeta politiko", "Tibeta montaro" - nenecese diri "Tibet(an)a". Fakte la nocio "popolo" kaj "lando" aŭ "lando" kaj "popolo" estas tiom interdependa, ke preskaŭ ne eblas havi iun nocion sen la alia, escepte tamen se ekzistas iu lando sen koncerna popolo (ekz. "Antarktio", "Everesto") aŭ popolo sen lando (ekz. ciganoj, Esperanto (lingvo)).

c) Ankaŭ aldoneble, ke troviĝas iuj gento-sencaj Nomoj, kiuj laŭkutime ne taŭgas por nomigi individue la simplan "ulon" aŭ "anon" de tiu gento, sed

signifas la tutan genton aŭ koncernan landon, ekz. Izrael el kiu aperas "Izraelido, Izraelano...

El ĉio tio oni konkludas, ke almenaŭ laŭ iuj personoj aparte, aŭ specife por iuj Nomoj, estas iom arbitre klasigi tiujn Proprajn Nomojn en du (rigide) apartajn bone-difinitajn senco-bazajn grupojn, respektive "popolo" aŭ "lando".

Fakte el tio kvazaŭ ŝajnas, ke inter tiuj bazaj ideoj - la (pure) gento-sencaj (je unu flanko) kaj la aliaj (pure) lando-sencaj (ĉe alia flanko) se tio tamen eblas..., aperas almenaŭ pli malpli grava kvanto da aliaj tiuspecaj Geografiaj Propraj Nomoj pri kies sencoj oni dubas ĉu ili estas je unu flanko aŭ je alia flanko.

## B- LA ADJEKTIVA KARAKTERO DE LA GEOGRAFIAJ NOMOJ:

a) La ĉi supra problemo leviĝas en la praktiko, nur kiam oni uzas la substantivan formon (en "-o") pretendante preni el la radikalo precizan unikan sencon ĉu gentan ĉu landan. Tia problemo tute ne sentiĝas, kiam oni uzas la adjektivan formon de la radikalo, kies substantiva funkcio estas donata pere de alia preciziga rimedo aŭ implice subkomprenata. Vere la "o" formo ne povas iamaniere doni aŭ modifi la esencan sencon de la radikalo, ĉar ĝia funkcio ĉe la vorto-fino estas nur forme substantivigi la nocion, kiu ja esence estas en la radikalo.

b) Tamen, kiam oni uzas adjektivo-forme la radikalon, tiam oni ne pretendas elpreni el ĝi iun el tiuj aparte unikan sencon - kiun ĝi ne havas unikece - sed indikas tiun sencon per alia rimedo; do, la problemo tute ne aperas aŭ almenaŭ ne sentiĝas praktike. Tiuokaze la Nomo estas libera por senci precize, en sia geografia tuteco, ambaŭe la landon kaj la koncernan popolon. Tiu fakto montriĝas precipe en Fizik-Geografia Nomigado, kie la Nomoj estas grand-parte uzataj en adjektiva formo.

c) Tiu adjektiva karaktero same evidentiĝas, kiam oni ekzemple diras: La "franco", formo kiu neeviteble nin pensigas pri "franc(ul)o", vere "Franca ulo", same kiel se oni dirus "bonulo" = "bona ulo"...

Kaj ali-aspekte, se oni ekzemple pensas pri "angolano", oni same pensas pri iu "ano" (aŭ "ulo") de Angola lando, precize "angol(a land) ano". Tie--ĉi same la vorto Angola estas karaktere "lok-atributiva" de iu geografieca substantiva senco.

El tio oni konkludas, ke la adjektiva formo de ĉi-tiuj radikaloj, kiam ili estas precipe Geografiecaj, t.e. "laŭ-loke atributivaj", ili samtempe povas indiki ankaŭ la koncernan genton, kiel signon de ties homa vivo, kaj kiam ili estas precipe aŭ eventuale gento-sencaj ili same povas indiki la koncernan landon, kiel bazon de propra surloĝado.

Finfine tio same evidentigas la nestabilecon de la pretende klasiga sistemo pro la ne precizaj limoj de la regulo dugrupe apartigante Nomojn, kiuj nur sencas duece samvorte.

KOMBINA KONKLUDO:

Konstatite, ke - tiel la dusenceco de la nocio "gento-lando" kaj inverse "lando-gento" de ĉiu aparta geografia Propra Nomo, kiel ĝia pruvebla esence "lok-atributiva" karaktero, estas paralelaj varioj, kiuj al ni diktas ke:

Unue: - La substantiva formo de tiuj vortoj ne povas per si mem (ion) ŝanĝi aŭ aldoni al sia esenca senco, sen ties taŭga indikilo pere de alia sencohava rimedo - vort(er)o aŭ subkompreno.

Due: - Estas precize la aldono al tiuj radikaloj, de la sufiksoj "ujo" aŭ "ano" respektive "lando" (= tuto) kaj "gento (ties individuo)" - kiu pli firme nin diktas, en kia senco oni prenas la uzatajn radikojn.

Konkludaj ekzemploj

Se oni diras "Germanujo" tio sencas pri lando (=ujo), kies enloĝantoj estas karakterize la Germana gento. Por tiu celo oni uzas du elementojn: La Geografian (Propran Nomon) "German"... kaj la suf-on "ujo". Inter unu kaj alia metiĝas subkomprenate la nocio "ulo" (=ano de gento) en substantiva funkcio - ĉar la suf. "ujo" akceptas kiel radikon nur substantivajn nociojn. La atributiva Geografia nocio estas reprezentata per la unua elemento dum la lasta elemento "ujo" devigas ĝin subkomprenate reprezenti substantivece la kromajn nociojn.

Same, kiam oni diras "Peruano", oni komprenas, ke tio koncernas (individuon) enloĝanton en la lando nomata "Peruo", vere "Peru(a land)o" kiu same eble havas iujn karakterizajn markojn de ties koncerna(j) popolo(j). Ankaŭ ĉi-tie la Geografia atributiva nocio estas donata de la radikalo "Peru-"; la lasta elemento de la vorto (la suf. "ano") devigas nin kompreni substantivece - en unu tuto - la radikalon, samtempe gent- kaj land-sence.

Do, ne estas precize la Geografia radikalo, kiu al ni diktas sian (pretende rigidan) sencon de "lando" (=tuto) aŭ "ano" (=ulo, ero de la tuta gento de tiu lando), sed pli vere: estas la uzo de tiuj (kaj aliaj) rimedoj, kiuj al ni diktas en kia senco la radikalo devas esti komprenata. Do, estas pro tio, ke la objektiveco de la regulo aŭ subjektiva percepto de la uzanto, kvankam uzante la taŭgan indikilon de la senco sub kiu oni devas kompreni la plenformitan Nomon, tute ne evitas eventualan alian uzon.

## ĜENERALA VALIDECO DE LA REKONO DE LA ATRIBUTIVO-SENCA NOCIO DE LA PROPRAJ NOMOJ POR ĈIUJ KAMPOJ DE UZADO

Spite tion, ke oni komparis nur Nomojn de la tipo "lando" - "gento", oni vidos tuj sekve, ke ĉiu Propra Nomo estas precipe atributivo-senca de iu implica komuna substantiva senco, ĉu oni ĝin uzas substantivo-forme ĉu adjektivo-forme.

i/ - La Propra Nomo trovebla en substantiva formo estas vere "la propra Nomo", kies radikalo estas la "propra atributo" de la substantivnocio, kiun implice ĝi "propre" atributivas...

ekz. p e r s o n e c a j :

Ludoviko = Ludovik(noma hom)o
Venuso = Venus(noma diin)o
Kaprikornio = Kaprikorni(noma konstelaci)o

g e o g r a f i e c a j :

Atlantiko = Atlantik(noma Ocean)o
Israelo = Israel(noma popol)o
Everesto = Everest(noma mont)o
Jordano = Jordan(noma river)o
Gvineo = Gvine(noma teritori)o
Kipro = Kipr(noma insul)o
Porto = Port(noma urb)o
sviso = Svis(land-an)o

Pluraj konsideroj:

Estas precize la "atributiva" senco de la radiko, kiu devigas la Nomon fariĝi ties "Propra Nomo" kaj kies komunan koncepton ĝi specife indikas ĉar ĝi estas - kvazaŭ direble - la Propra Nomo nur de tiu komuna koncepto.

La sistemo de per "-o" substantivigi la Propran Nomon aŭ tiuforme ĝin akiri el la naciaj ortografioj estas ekonomia sistemo, ĉar devigas nin "nomece" kompreni la atributivan (reprezentantan) Nomon kune kun la (implica) komuna ideo, ĉio entute en unu nura formo.

Krome, la substantiva formo aldonas al la Nomo la nocion de "memstareco, vireco, forto".... kaj precize pro tia fakto oni ĉe la Nomoj de Personoj ĝin speciale dediĉas al la Nomigado de la Vir-Nomoj, kvankam nur pro simpla akomodeco.

ii/ - La Propra Nomo akceptita en sia adjektiva formo same estas gramatike pritraktebla, kiel iu substantivo implice subkomprenata en la atributiveco mem. Tia uzo eĉ koincidas kun la lingvistika fenomeno, ke adjektivo povas atribútive reprezenti la implican substantivon, fakto ne malofta en la vulgara uzo de la Lingvo.

| ekz. personecaj: | iuj reeksplikoj (praktikaj) |
|---|---|
| Elizabeta = Elizabet(nom)a virino | |
| Jesaja = Jesaj(nom)a viro | |
| geografiecaj | |
| Europa = Eŭrop(nom)a Kontinento | Eŭropa Kontinento |
| Italia = Itali(nom)a lando, nacio(!) | Italia (lando) |
| Angola = Angol(nom)a Teritorio | |
| Malta = Malt(nom)a insulo | Malta Insulo |
| Braga = Brag(nom)a urbo | |

Pluraj koncernaj konsideroj:

Tiu same ekonomia sistemo estas riĉe enhava de lingvistika signifo kaj krom tio ĝi povas prezenti, kiam konvene, la Nomon en ĝia nacia formo.

Pro la fakto ja konstatebla, ke la adjektiva formo estas substantiv-apoga, ĝi havas la sencon de "subtileco, pretemeco, mildeco, dolĉeco, ineco"... kaj pro tia fakto oni preferis kaj jam decidis, ke ĝi estu ĉe la Propraj Nomoj de Personoj, la formo por la "In-Nomoj".

iii/ - Krom la Propraj Nomoj aperintaj en substantiva kaj adjektiva formo, same ankaŭ tre granda kvanto povas prezentiĝi sen iu ajn vokal-finiĝo - - t.e. finiĝantaj per (radikala) konsonanto - laŭ la kutimoj trovataj diversloke sur la Tero.

- Sama fakto estas ankaŭ regula procedo en nia Lingvo ĉar ĝi paralelas kun la komunlingva elizio de la finaĵo "o" ĉe speciala stilo poezia kaj alia.

Tia neevitebla substantivo-nocia formo estas tria metodo akiri el la naciaj lingvoj tre grandan kvanton da Propraj Nomoj en ilia plej konvena internacia formo, kaj oni diru: ĉiam en plena obeo al la reguloj trovataj en la komuna Lingvo.

iiii/ - Krom la menciitaj tri tipoj de Propraj Nomoj, kiujn laŭ la finvokalo oni povas nomi respektive i) "vir-vestitaj", ii) "in-vestitaj" kaj iii) "nud--vestitaj" ankaŭ aperas ie kaj tie alia pli malpli heterogena tipo de vokal-finiĝantaj Nomoj, kiuj ne sekvas la ĉisuprajn regulojn, jen:

a) - La Nomoj finiĝantaj per neakcentita vokalo - precipe "e" (sed ankaŭ "i" kaj "u"), - kies substantiva funkcio evidentiĝas pro ilia pozicio en la frazo, ekz. Nice, Odense, Tampere,... (Helsinki,... Turku...).

Tiu finaĵo en la Propra Nomo povas esti konsiderata kiel "fremda" vestaĵo de "fremd-vestita" Nomo kontraste al la konvena ortografifonetika aspekto de la vorto, el kies tuto nur la finaĵo ("e" aŭ alia) estas fakte fremda kaj kiun oni tamen normece ŝanĝus cele al kreo de (eventuale iu alia) "asimilita" formo. Tia naci-forme adaptita uzo eĉ pruntas al la teksto kvazaŭ specialan "spicon" en la ortografi-fonetikaj eblecoj.

b) - Se tamen la fin-vokalo de tiuj Propraj Nomoj estas akcentitaj kaj tio okazas precipe ĉe Nomoj finiĝantaj per la "akutaj" vokaloj "i" aŭ "u", oni ilin eble nomigus "pseŭdo-vestitaj" - (ĉar vere "ne-vestitaj" - kaj tiaokaze la respondaj "paralel-asimilitaj" formoj aperus per aldono de la Esperanta finaĵo al la vokal-finiĝanta radikalo, ekz. Kapri, Turku,...

c) - Finfine - pro diversaj kaŭzoj aparte priatenteblaj - okazas ke oni povas trovi, ke la sama naci-forme vokal-finiĝanta Nomo, kiam uzata simple nur siaelemente estas klasigebla sub "a)" t.e., kiel "fremd-vestita". Do ties finvokalo estas neakcentita, kvazaŭ ekster- radikala.

- Sed se ĉe tiu sama naci-forme vokal-finiĝanta Nomo, kiam uzata derivigita, oni preferas aldoni la kromajn elementojn al la plene iamaniere "naci-vestita" formo, tiam la tiu-aspekte sama Nomo klasiĝas sub "b)" ĉar ties vokal-finaĵo funkcias kiel parto de la radikalo, ekz. Nice'ano. - Simila fenomeno o--kazas ĉe tuj antaŭe menciitaj "o- kaj "a- "naci-vestitaj" formoj tiaforme akceptitaj en la Lingvo, ekz. (eble libervola "Osloano").

Tio estas natura fakto kaj ĝin ne konsideri, anstataŭ ĝin konstati, estus preterlase krei diverĝan alian nenaturan veron.

PARTIKULARA NOTO:

Kiel ekzemplojn de ĉi-tiu artikolo, mi tre volonte proponus ĉiujn trovaĵojn en la artikolo de S-ro: H. Seppik - Tallin - Sovetio, en la Scienca Revuo n-ro 2/3 de 20.05.1974., pri kio mi punktopunkte plene akordas. Aldone mi ankaŭ diru ke - leginte en tiu artikolo la aserton: "la popolnomoj... ne estas propraj nomoj"... - mi gajne (kaj eble evoluonte) korektis antaŭan opinion mian, do dankon.